

**INFORMILO DE KKE — KULTURA KOOPERATIVO DE ESPERANTISTOJ**

Cooperativa Cultural dos Esperantistas Ltda. — Av. Treze de Maio, 47, sobreloja 208 — Centro  
Rio de Janeiro - RJ — CEP.: 20031-921 (21) 2544-4314 Fax: (21) 2220-7486  
retpoŝta adreso: [esperanto.kke@gmail.com](mailto:esperanto.kke@gmail.com) ttt-paĝo: [www.kke.org.br](http://www.kke.org.br)

**Nº 57****9ª JARO (NOVA FAZO)****JULIO-AŬGUSTO/2010****ĈI-NUMERE: INTERVJUO KUN GERALDO MATTOS**

## Eventos

**Mai, 3** – Roda literária / Prosa em esperanto / Coordenação de Aloísio Sartorato.

**Mai, 5** – Clube de Conversação / Bate-papo com Jair Salles.

**Mai, 7** – Palestra de Saulo Salgado Wanderley sobre o tema *Pensoj kaj Kvantuma Fiziko*, com a presença de 19 pessoas.

**Mai, 10** – Roda Literária / Poesia em esperanto / Coordenação de Aloísio Sartorato

**Mai, 12** – Clube de Conversação / Bate-papo com Jair Salles.

**Mai, 14** – Palestra de Emmanuel de Souza Lima sobre o tema “Energia Alternativa”, com a presença de 15 pessoas.

**Mai, 17** – Roda Literária / Literatura brasileira em esperanto / Coordenação de Aloísio Sartorato.

**Mai, 19** – Clube de Conversação / Bate-papo com Jair Salles.

**Mar, 21** – Palestra de Aloísio Sartorato sobre o tema *Propono de Nova Instru-metodologio por Postbazaj Kursoj*, com a presença de 9 pessoas.

**Mar, 22** – Projeto *Konu Rio-n Piede*: Visita ao Forte Copacabana e Aldeia dos Pescadores, ciceroneada por Laura Pereira de Alcântara

**Mai, 24** – Roda Literária / O estilo de Zamenhof / Coordenação de Aloísio Sartorato.

**Mai, 26** – Clube de Conversação / Bate-papo com Jair Salles. (violão) e com a presença de 14 pessoas.

**Mai, 28** – *Festa dos Aniversariantes*, com a presença de 10 pessoas.

**Mai, 31** – Roda Literária / Teatro em esperanto / Coordenação de Aloísio Sartorato.

**Jun, 2** – Clube de Conversação / Bate-papo com Jair Salles.

**Jun, 7** – Roda Literária / Poesia em esperanto / Coordenação de Aloísio Sartorato.

**Jun, 9** – Clube de Conversação / Bate-papo com Jair Salles.

**Jun, 11** – Palestra de Osmar de Agostinho Filho sobre o tema *Fenômenos Paranormais*, com a presença de 21 pessoas.

**Jun, 14** – Roda Literária / Literatura brasileira em esperanto / Coordenação de Aloísio Sartorato.

**Jun, 16** – Clube de Conversação/Bate-papo com J. Salles.

**Jun, 18** - Palestra de Jair Salles sobre o tema *A Estrutura da Frase em Esperanto*, com a presença de 13 pessoas.

**Jun, 21** – Roda Literária / O estilo de Zamenhof / Coordenação de Aloísio Sartorato.

**Jun, 23** – Clube de Conversação / Bate-papo com Jair Salles.

**Jun, 25** – *Festa dos Aniversariantes*, com a participação especial de *Genésio Nogueira*

**Jun, 28** – Roda Literária / O estilo de Zamenhof / Coordenação de Aloísio Sartorato.

**Jun, 30** – Clube de Conversação / Bate-papo com Jair Salles.

## Doações para a Caixa Geral

Neide Barros Rêgo: R\$ 150,00; Vários (arrecadação da rifa): R\$ 122,00. *Koran dankon al ĉiuj!!!*

## Novos Associados

1740. Graça Eliana Thuler Santos; 1741. Sílvio Márcio Camargo Bruno; 1742. Renata Ramos da Silva Morgado. *Estu ĉiuj bonvenaj!*

## Doações da campanha Esperanto nas Bibliotecas

93. Biblioteca da Escola Municipal Prof. Antonio Perón, em Salto do Lontra, PR.

## Expediente

**InKo**, boletim informativo da Cooperativa Cultural dos Esperantistas; edição nº 57, julho-agosto/2010.

**Coordenação:** Givanildo R. Costa, Presidente da KKE.

**Redação:** Aloísio Sartorato

**Revisão:** Célio F. Martins

## **KONSIDEROJ PRI BRAZILA ESPERANTA KONGRESO**

Ni scias ke multe oni devas fari por plibonigi niajn esperantistajn eventojn kiel ekzemple renkontojn, ĉar ili starigas senson de kunigo kaj de ampleksigo bone enmetitan de la Pola Amiko, kies rezulto estas la firmigo de la Internacia Lingvo en la brusto de la Homaro.

Pri tio ni ne dubas, sed ĉu ni, vere, atentis pri tiu bezonata plibonigo? Ĉu ni, kun konsciigo, taksas kiajn konsekvencajn rezultojn estos ĉe nia esperantista medio se tiu E-movada aranĝo efektiviĝos?

Foje ni supraĵe, teorie, faras belajn kaj strategiajn planojn, sed kiam oni estas alvokata por konkrete starigi ilin, oni devojiĝas. Cetere, tio estas ago historia en nia Esperantista Movado, brazila kaj eĉ monda.

Alie estos se la Esperantistaro adoptos firman kaj sindediĉan sintenon, sen fantaziaĵoj, surbaze de konsekvenca kaj peniga laborego okazigita, dum multe da jaroj, de tre malgranda kvanto da gesamideanoj en la tuta mondo, kaj ankaŭ en Brazilo.

Ni estas antaŭ viva realaĵo, kiu estas Esperanto, kaj pro tio niaj nunaj faroj devos esti laŭ la trafeco de la homa kunvivado, kaj ne de teorialaj proponoj.

Mi ne plene asertas tion, sed oni havas la impreson ke grandparte la geesperantistoj preferas resti dum la tuta tempo diskutante sen granda profito, ol agadi, objektivite decidante pri la urĝa neceso firmigi la idiomon.

Kial mi insistas pri tia konsidero rilate al tiu jam citita plibonigo? Okazas ke kiom da fojoj ĝi estis atentigita per pluraj ĵurnaloj, revuoj, bultenoj, ktp, ankaŭ per nia "INKO", ĉu ni trafte celis ĝin?

Mi ĵus alvenis el la urbo Campo Grande, brazila ŝtato Mato Grosso do Sul, kie okazis la 45-a Brazila Kongreso de Esperanto, de la 13-a ĝis la 16-a de Julio 2010. Tutcerte, ĝi estis sufiĉe bona. Oni havis bonajn momentojn, ekde la ĉeftemo, kiu atentigis nin pri la graveco de la esperantaj pioniroj, inter ili Zamenhof, Edmond Privat, Brás Cosenza, Sylla Chaves kaj aliaj, per prelegoj kaj informoj pluraj, ĝis la arta vespero, kiu estis bone prezentita. Ankaŭ mi volas emfazi la partoprenon de eksterlandanoj, inter ili tri infanoj francaj, krom la ĉeesto de gravaj esperantaj institucioj gravaj kiel ekzemple, nia KKE, kiu fariĝis 59-a jara, pro ĝia datreveno en la 14-a de Julio.

Mi ne povas forgesi la dediĉan laboron de la Loka Komitato kies partoprenantoj heroece multe faris, inter ili, Ataíde Godói, Maria Garcia. Ankaŭ mi, tre ĝoje, atentigas vin pri la prelego farita de mi pri Braz Cosenza kun la partopreno de S-anoj Jair Salles, Amarílio Hévia de Carvalho kaj aliaj, kiu emociigis al ĉiuj ĉeestantoj.

Sed, kvankam profita estis la kongreso, ni bezonas plibonigi ĝin. Ni ankoraŭ faras kelkajn erarojn pro manko de iu grupo kiu devas specife zorgi pri kongresoj kaj eventoj kun tia grandiozeco.

Se ni iom pli serioze pritraktos niajn naciskalajn esperantajn kongresojn, tutcerte, ili estos unu inter la plej gravaj kaj ĉefaj en la tuta mondo.

Ni bezonas, rapide, zorgi pli trafte pri nia Brazila Esperanta Movado.

**Givanildo Ramos Costa**

# ESPERANTIDO (REFORMA DO ESPERANTO)

Cleber de Moraes Lemos



## INTRODUÇÃO

Em primeiro lugar quero parabenizar a Diretoria da Cooperativa Cultural dos Esperantistas pela demonstração de espírito democrático e de coragem ao dar oportunidade para divulgação de iniciativas que muitos podem considerar como opiniões contrárias ao Esperanto. Na verdade o Esperantido é tentativa de salvar da extinção o essencial da ideia da Língua Internacional Neutra Esperanto, criada por L. L. Zamenhof.

## **O ESPERANTO PRECISA DE REFORMA?**

A resposta é: intrinsecamente não, mas depois do advento da internet a resposta é: sim!

## **O PROBLEMA DAS LETRAS “COM SUPERSIGNOS”**

O Esperanto não transita, suavemente ou tranquilamente, na internet por causa das letras “com supersignos”. Há comunicadores que opinam que, no campo da comunicação, principalmente no campo da comunicação internacional, quem não transitar, suavemente ou tranquilamente, na internet, está fadado à extinção.

## ELIMINAÇÃO DE “SUPERSIGNOS”

Daí, infere-se que o Esperanto precisa da eliminação das letras “com supersignos” de seu alfabeto.

### ALFABETO DO ESPERANTIDO

No alfabeto do Esperantido (tentativa de reforma do Esperanto), além da eliminação das letras “com supersignos”, foram eliminadas, ou modificadas, também, letras “sem supersignos”, mas que foram consideradas inconvenientes do ponto de vista fonético.

Segue o alfabeto do Esperantido com interpretação do som de cada letra (em parênteses) em letra minúscula: **A** (a), **B** (bô), **D** (dô), **E** (ê), **F** (fô), **G** (gô), **H** (rrô), **I** (i), **J** (jô), **K** (cô), **L** (lô), **M** (mô), **N** (nô), **O** (ô), **P** (pô), **R** (rô, como em arôma), **S** (sô), **T** (tô), **U** (u), **V** (vô), **W** (uô), **X** (chô), **Y** (iô), **Z** (zô).

### MODIFICAÇÕES PONTUAIS

Já que houve necessidade de mexer no alfabeto e, conseqüentemente, no vocabulário, mexeu-se também em alguns poucos pontos da gramática do Esperanto.

### O ESPERANTIDO NA INTERNET

Uma vez que o Esperantido transita, suavemente ou tranquilamente, na internet, foram lançados na internet a 1ª Gramática do Esperantido e o 1º Vocabulário Português-Esperantido / Esperantido-Português.

### SÓ POR CURIOSIDADE

Os leitores do **INKO** estão convidados a estudar o Esperantido no “site” [www.esperantido.com.br](http://www.esperantido.com.br), nem que seja só por curiosidade.

## INTERVJUO KUN GERALDO MATTOS



***INKO: Kiam kaj kiamaniere vi esperantistiĝis?***

En la komenco de 1947, mi eniris en la bibliotekon de la Franciskana Seminario de la Paranaa Rio Negro kaj tie vidis 12-paĝan germanan lernolibron pri Esperanto. Kun helpo de germandevena seminariano ni komencis la legon, ĝis li retiriĝis, ĉar la libro estis obscena: Fräulein [fraŭlino] estis prostituistino en lia germana dialekto.

***INKO: Kiuj estis viaj unuaj paŝoj en la Esperanto-movado?***

Miaj unuaj paŝoj en la Esperanta Movado kondukis min en 1953 al la strato Rua das Marrecas, kie la verdaj kariokoj kunvenis, kaj tie mi trovis mian edzinon, kiu tamen mortis tridek jarojn poste kaj ĝuste en la tago de la patrinoj [nun: kvara edziĝo kaj 6-jara infano].

***INKO: Oni diras, ke vi iam en via juneco loĝis kun Ismael Gomes Braga.***

***Ĉu vi povas rakonti pri tio?***

Lian adreson mi ricevis de la esperantisto Lauro, el Araras, veninta al la seminario en Agudos. Mi tuj sendis leteron al Ismael kun soneto. Li tuj respondis kaj niaj interleteroj multiĝis, ĝis la pastroj ne plu malfermis ilin: la

unua ĝojo, kiun Esperanto donis al mi, kaj multaj postaj. Antaŭ ol iri al mia familio, mi vizitis lin je la 7-a matene kaj restis, ĝis li diris al mi en la fino de tiu tago: de nun vi loĝos kun mi.

***INKO: Vi elstarigas en la E-movado plurfake. Unu el ili estas via verkista kariero. Kiun rolon havis KKE en la komenco de via verkista laboro?***

Gesinjorojn Cosenza kaj Cedilha mi tuj konis en KKE, kien ofte mi iris kun Ismael, kaj eĉ restis unu tutan semajnon ĉe ili, kaj mi plej memoras pri la tiea restado pro la manko de akvo, sed ne nur tie... Tie mi multe profitis por mia lingva perfektigo. Daisy, mia edzino, estis unu el la malnovaj membroj: se mia memoro ne misas, numero 54.

***INKO: En iu momento de via esperantista vivo vi estis Prezidanto de la Akademio de Esperanto. Ĉu vi povas paroli iomete pri tio?***

Mi estis ĝia prezidanto inter 1998 kaj 2007 dum tri periodoj. La laboro estis plejparte trankvila, sed ĉiam laboriga kaj paciga. Mi intencas kandidatiĝi...

***INKO: . Pri kio vi nuntempe okupiĝas en la E-movado?***

Mi estas membro de la Akademio de Esperanto ekde 1970, la plej malnova post Marjorie Boulton, akademiano de 1967, kaj la reto nun laborigas nin tre multe. Mi tamen publikigas multajn eseetojn pri la lingvaj problemoj de nia amata Esperanto.

***INKO: Ĉu vi povas indiki por la novuloj tri librojn nepre legindajn en Esperanto?***

Por koni la lingvon kaj ĝiajn celojn, ĉiu devas plurfoje legi la Fundamenton de Esperanto kaj la librojn de Zamenhof. Por plena ĝuo, estas multaj poetoj kaj prozistoj, kiuj atendas iliajn aĉetojn.

***INKO: Kion Esperanto signifas por vi?***

Mia vivo!...

***INKO: Koran dankon!***

# Kvantume, fizike, finfine!

Saulo Salgado Wanderley

## *Kio ĝi estas?*

Kompare, ni povas diri ke la Teorio de la Relativeco, karakterizata de la lumrapideco,  $c = 300.000 \text{ km/s}$ , ampleksigas la kampon de aplikado de la fizikaj leĝoj ĝis la regionojn de altaj rapidecoj, kaj la kvantuma fiziko, karakterizata de la konstanto de Planck,  $h = 6,626 \times 10^{-34} \text{ J.s}$ , ampleksigas tiun kampon ĝis la regionojn de la etetaj dimensioj.

## *Kiam ĝi komencaperis?*

La fizikistoj – almenaŭ kelke da ili – asertas ke Max Planck prezentis teknikan publikaĵon pri la teorio de la leĝo de distribuo de energio de la normala spektro, je la 14<sup>a</sup> de decembro 1900, en la Germana Fizikista Asocio. Tiu tago estas konsiderata kiel naskiĝtago de la Kvantuma Fiziko. La artikolo de Planck komencis revolucion en la Fiziko. Kvarono de centjaro poste, Schroedinger kaj aliaj fizikistoj komencis la disvolvigon de la moderna Kvantuma Mekaniko, bazo de niaj nunaj konceptoj pri naturo.

## *Bona kontribuo de la Kvantuma Fiziko al niaj komunaj vivoj:*

Permesas al sciencistoj analizi la penson kaj ĝian interferon en la materion.

## *Ĉu alia kontribuo?*

Ĝi definitive deklaris la observantan konsciencon elemento aganta en la fizikaj fenomenoj.

Penso estas energispeco sendata de ni tra spacoj havantaj pli ol tri dimensioj.



### ***Mencianta kuriozan fenomenon ...***

Dum la jaro 1935 okazis eksperimento nomata “Eksperimento de la duobla fendo”, kiu revoluciigis la tradician logikon: elektrono ĵetata kontraŭ plako havanta du fendojn sintenis kelkfoje kiel ondo, kelkfoje kiel partiklo.

Demandis ĉiuj: kio okazis finfine?

Respondis la kuraĝuloj: La penso de la eksperimentantoj interferas en la eksperimenton; ili komencis konsideri konscian gradon de la partiklo. Elektrono, malgranda konscienco, klopodanta kontentigi la homan, “grandan konsciencon”.

Fizikistoj nune ne plu dubas pri tiu fakto: simpla mezurklopodo modifas la sintenon de la partiklo. Do, ne ekzistas observanto kaj observata partiklo, sed ili ambaŭ konsistigas sistemon veran, kaj agas kune.

### ***Ĉu alia bona fizikisto mencienda?***

Jes: Fritjof Capra. “Mia konscia decido pri la maniero laŭ kiu mi observos elektranon determinos, ĝis ia amplekso, ĝiajn proprecojn”.

### ***Ĉu alia?***

William Tiller, ph.D, kreis elektronikan ekipaĵon, kiu reduktas la ph de akvo, unu kemian unuon, sub la influo de meditantej meditantej apud ĝi.

### ***Unu plia afero grava kaj interesa...***

Sciencisto nomata Candace Pert asertas ke ni, pere de niaj emocioj, kreas en la hipotalamo kemiajn estaĵojn, kiuj nutras niaj ĉelojn, bonfare aŭ ne...

**(Resumo de prelego farita en la sidejo de KKE, en Rio, la 7-an de Majo 2010)**

# KANTU

Raymundo Souza

Kantu, kantu kun mi,  
mi ne volas kanti sola.  
Aŭdu, aŭdu mian kanton:  
ĝi parolas pri amo kaj unuiĝo  
sen limoj inter la popoloj.  
Kantu, kantu kun mi.  
Faru ni, ke nia kanto atingu  
ĉiujn, kiuj estas disaj.  
La diasporo estis iu tago  
de unusola popolo, sed hodiaŭ  
ĝi estas de ĉiuj nacioj.  
Forgesu ni niajn fieron kaj malfacilaĵon.  
Ni ne estas irananoj aŭ hebreoj,  
brazilanoj, rusoj aŭ afrikanoj,  
ni ĉiuj estas la homaro.  
Kantu, kantu ĉiuj ni unusone:  
ni lasu flanke la fieron,  
estu ni reale fratecaj  
kaj iru ni direkte al la kompreno,  
al la komuna bono kaj al la grandeco  
unika, senegala, kiu estas DIO.

Al kara amikino Maria Lina Pequeno

**KIEL VI STATAS?**

- ETERNA KOMENCANTO?  
 KROKODILO?  
 VERDA PAPAGO?

**QUAL É A SUA?**

- ETERNO PRINCIPIANTE?  
 CROCODILO?  
 PAPAGAIO VERDE?

**1 - ETERNA KOMENCANTO/Eterno Principiante** – No Brasil e no mundo, é bem conhecido o fenômeno dos “eternos principiantes”. Trata-se, naturalmente, de coidealistas que, após 5, 10 ou mais anos de frequência no Movimento Esperantista, não conseguem falar com fluência o Esperanto. Essas pessoas assistem a diversas palestras na sua associação local, gastam tempo e dinheiro em vários congressos – mas, sempre que tentam conversar em Esperanto, logo sentem a falta de “vocabulário” ou se esquecem do que já sabiam e apresentam a costumeira justificativa: “Mi estas komencanto...” E logo passam a falar na língua nacional... Em geral, esse problema tem solução – embora exija um bom esforço do interessado. Mas esse esforço especial não precisa ser muito longo: em geral, um ano de dedicação séria ajuda muitíssimo. Se o interessado optar pelo nosso método, sugerimos que estude pelos nossos três livros principais: MINICURSO DE ESPERANTO (Curso Introdutivo – com apenas 5 fáceis lições); ESPERANTO CONVERSACIONAL (Curso Básico – com 10 lições); LA KONVERSACIA KLUBO (Curso de Aperfeiçoamento – com 10 lições e um “Suplemento Gramatical” bastante detalhado). O estudo, como sempre acontece pelos nossos livros, pode ser feito “com ou sem professor”. Em geral, o mais importante para a maioria é o estudo bem sério do “Suplemento Gramatical” do 3º e último livro da série, ou seja, “La Konversacia Klubo”. Enfim... se você é um “eterno principiante”, decida que – neste ano – você começará a deixar de sê-lo. Só depende de você... E a compensação... realmente vale a pena!...

**2 - KROKODILO/Crocodilo** – Pelo menos em princípio, admite-se que o “crocodilo” sabe falar em Esperanto – mas é um tanto preguiçoso e prefere falar em língua nacional até em congressos só para evitar algum esforço mental no uso mais fluente da língua. A esses recomendamos que leiam várias revistas e livros com auxílio de bons dicionários. Assim, logo sentirão enorme prazer na conversação sobre assuntos “mais profundos”, usando um vocabulário muito “mais rico” em Esperanto...

**3 - VERDA PAPAGO/Papagaio Verde** – Este, sim, é o seu estado ideal de esperantista!... Para chegar a tal estado tão gratificante, faça o seguinte. Se você optar pelo nosso método (com ou sem professor), sugerimos que, primeiro, estude (ou reestude) bem os nossos 3 livros principais – e, depois, analise também o nosso livro extra “LA REVENO” (Livro de Leitura Avançada – com apenas 10 capítulos). Depois disso, leia várias revistas e livros com auxílio de bons dicionários. Finalmente, consulte, quando necessário, a excelente gramática do sueco Bertilo Wennergren, chamada “PMEG” (= Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko), toda em Esperanto – em forma de livro (R\$ 90,00). Ou consulte-a de graça, pela Internet (<http://bertilow/pmeg>). Assim, ainda neste ano, você poderá passar do estado de “krokodilo” para o de um excelente “verda papago”... E talvez chegue até a tornar-se um grande palestrante do nível dos nossos excelentes oradores, como Paulo Sérgio Viana, Elmir dos Santos Lima, Geraldo Mattos, Floriano Pessoa, José Passini – e vários outros!...



Saulo Salgado Wanderley prelegas



Jair Salles prelegas



Emmanuel Lima prelegas



Genésio Nogueira parolas al la publiko